TRIA DIMANĈO DE ADVENTO - 13an de decembro 2009

KAJ NI, KION DO NI FARU? - Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 3,10 -18

En tiu tempo la homamasoj demandis al Johano, dirante: Kion do ni faru? Kaj responde li diris al ili: Kiu havas du tunikojn, tiu donu al la nehavanto; kaj kiu havas manĝaĵon, tiu faru tiel same.

Venis ankaŭ impostistoj, por esti baptitaj, kaj ili diris al li: Majstro, kion ni faru? Kaj li diris al ili: Ne postulu pli multe, ol estas ordonite.

Kaj ankaŭ soldatoj lin demandis, dirante: Kaj kion ni faru? Kaj li diris al ili: Ne perfortu iun, nek maljuste ion postulu, kaj estu kontentaj je via salajro.

Kaj kiam la popolo atendis, kaj ĉiuj diskutis en siaj koroj pri Johano, ĉu eble li estas la Kristo, Johano respondis al ĉiuj, dirante: "Mi ja vin baptas per akvo, sed venas tiu, kiu estas pli potenca ol mi; la rimenon de liaj ŝuoj mi ne estas inda malligi; li vin baptos per la Sankta Spirito kaj per fajro; lia ventumilo estas en lia mano, por ke li elpurigu sian draŝejon, kaj kolektu la tritikon en sian grenejon; sed la grenventumaĵon li bruligos per fajro neestingebla."

Kaj per multaj aliaj konsiloj li evangeliis al la popolo.

Sankta Johano la Baptisto abrupte alparolis la homamasojn kiuj alkuris por esti baptitaj dirante al ili: "Ho vipuridoj, kiu vin avertis forkuri de la venonta kolero?" Ĉar la profetoj jam prezentis la tagon de la Sinjoro kiel la tagon de la kolero. Kaj li diradis al ili: "Donu do fruktojn taŭgajn por pento".

Tiam ni vidu la reagon en la evangeliero de la hodiaŭa liturgio, kie estas tri grupoj bone distingitaj.
Ĉeestas la homamasoj, la impostistoj kaj la soldatoj. "La homamasoj lin demandis dirante:"Kion ni faru?", kaj la respondo de la Baptisto nenion diros rilate al Dio, rilate al Religio, nek rilate al kulto.

Tion ni jam vidis pasintsemajne, la konvertiĝo al kiu invitas Johano la Baptisto ne estas la religia realveno al Dio, sed ĝi estas ŝanĝo de sinteno al aliuloj. Tiam Sankta Johano la Baptisto diras al la homamasoj:" Kiu havas du tunikojn, tiu donu al la nehavanto; kaj kiu havas manĝaĵon, tiu faru tiel same.".

Tio estas la Kunpartigo. Kun Sankta Johano la Baptisto komencas ŝanĝi la rilato al Dio, kiun poste Jesuo finos kaj eĉ la senco de la peko ŝanĝiĝas. La peko ne estas ofendo al Dio, sed ĝi estas ofendo al la homo. Estas tie ke tiam oni devas iom rebonigi. Poste elmontriĝas eĉ aliaj mirigaj roluloj, "Venis ankaŭ impostistoj". Kion tien venas por fari la impostistoj?

Por la impostistoj, kiuj apartenis al damnita klaso, estis neniu espero, eĉ se iu impostisto iam konvertiĝus, por li jam estis la makulo, la neforviŝebla stampo de la malpurulo, por kiu ne estis plu espero. Do ankaŭ ili "iras por esti baptitaj kaj ili petas" laŭvorte, "kion ni faru? Nome, kaj ni? Ĉu estas espero ankaŭ por ni? Ĉu estas io eĉ por ni?

Nu, mirige por ili, Sankta Johano la Baptisto ne petas ilin ke ili ŝanĝu sian laboron ĉar ili ne povus ne ĝin fari, sed li diras al ili: "Ne postulu pli multe, ol estas ordonite." Tio estas skandalo, li allasas al Regno de Dio, pere de la konvertiĝo, ankaŭ homojn kiuj, pro ilia publika, morala aŭ religia sintenoj, estas malmoralaj homoj. Kaj do, Sankta Johano la Baptisto ilin allasas kondiĉe ke ili ne postulu pli multe ol estas ordonite.

Kaj ĉeestas ankaŭ la soldatoj. La soldatoj, eble paganoj, kiuj petas ankaŭ ili kion ili devas fari, kaj la respondo estas: "Ne perfortu iun", la verbo indikas la ne perfortan prenadon de mono, "Ne eltordu monon", nome ne prenu monon per ĉantaĝo, "nenion al neniu kaj "estu kontentaj je via salajro", eviti la maljustecon.

Do estas tri grupoj, la judaj homamasoj, la ekskluditaj de Izraelo, kiel estis la impostistoj kaj la ellasitaj el la Regno de Dio, kiel estis la paganoj. Nu estas loko por ĉiuj tiuj. La evangeliisto daŭrigas: "Ĉar la popolo atendis, kaj ĉiuj diskutis en siaj koroj pri Johano, ĉu eble li estas la Kristo", nome la Mesio, tiu estis la atendo.

Johano respondis al ĉiuj, dirante: "Mi ja vin baptas per akvo" - la akvo estas elemento ekstera al la homo – "sed venas tiu", por kompreni tiun esprimon de Sankta Johano la Baptisto nun oni devas realkroĉiĝi al jura institucio de la geedziĝo. Diras Sankta Johano la Baptisto: "kiu estas pli potenca ol mi; la rimenon de liaj ŝuoj mi ne estas inda malligi".

Al kio rilatigas sin Sankta Johano la Baptisto? Li rilatigas sin al la leĝo pri la levirato. La leĝo pri levirato konsistis el tio: kiam virino vidviĝis sen filo, ŝia bofrato estis devigata gravedigi ŝin – de kie devenas la termino "levirato", fakte "levir" signifas "bofrato". Kiam pro iu ajn kialo la bofrato rifuzis tion fari, kiu havis la rajton tion fari post li, tiu komenciĝis la rito de la senŝuiĝo, li malligis la ŝuon de la viro kiu estis devinta gravedigi tiun vidvinon, li kraĉis en la ŝuon kaj tio signifis: "via rajto gravedigi tiun ĉi virinon transiras al mi".

Kaj tiu estis eĉ sufiĉe hontiga esprimo. La rilatojn al tio ni trovas en la libro de la Readmono, ĉe la ĉapitro 25a aŭ en la libro de Rut, ĉe la 4a ĉapitro. Tiam Sankta Johano la Baptisto ne estas donanta lecionon pri humileco, sed li diras

“Bonvolu ne preni min kiel tiun kiu devas gravedigi tiun vidvinon”. Kiu estas tiu vidvino? La rilato inter Dio kaj la popolo estis bildigita kiel tiu inter edzo kaj edzino.

Sed la pekoj kaj la malfidelecoj de Izraelo estis tiel multnombraj ke oni jam konsideris tiun rilaton finita, kaj Izraelo sin sentis kiel vidvino de sia Sinjoro. Tiam kiu venas revivigi tiun vidvinon ne estas mi, sed estas tiu kiu estas pli potenca ol mi. Ĉar Sankta Johano la Baptisto diris: “mi vin baptis per akvo, nun, kontraŭe li vin baptos per la Sankta Spirito”, kaj la Sankta Spirito indikas interna, intima, internan, intiman, profundan mergadon de la amo de Dio, kiu poste kapabligos la homon transformi sian propran vivmanieron.

Sed Sankta Johano la Baptisto diris: “Li vin baptos per la Sankta Spirito”, la Sankta Spirito kiu komunikas la vivon, “kaj per fajro”, temas pri la fajro de la puno, kiel li precizigas: “lia ventumilo estas en lia mano, por ke li elpurigu sian draŝejon, kaj kolektu la tritikon en sian grenejon; sed la grenventumaĵon li bruligos per fajro neestingebla”. Jen tiu estis la bildo de la Mesio kiu komunikis vivon al siaj sekvantoj, sed punis kaj skurĝis la malpurulojn.

Nu, Jesuo distancigos sin de li, Sankta Johano eraris. Kiam, en la agoj de la Apostoloj, Jesuo devos mencii Johanon la Baptiston, li diros: “kiel Johano baptis per akvo, vi baptiĝos per la Sankta Spirito post ne multe da tagoj”. Kaj la fajron Jesuo preterlasas, ĉar la Dio de Jesuo ne estas la Dio de Johano, kiu premias la bonulojn kaj punas la malbonulojn, sed Li estas Dio kies amo sin turnas al ĉiuj tiuj, al ĉiuj homoj.